pej aktuale

dulingva informilo de pola esperanto-junularo

dwujęzyczny informator polskiej młodzieży esperanckiej

№ 01/2019 | 2019-02-09

# Nova formo de PEJ-aktuale

## Nowa forma PEJ-aktuale

**Okaze de la nova jaro ni komencas kun nova formo de PEJ-aktuale.** Ĝis nun PEJ-aktuale funkciis kiel dissendata retmesaĝo, ekde nun ni pretigas ĝin en PDF-formo uzante sistemo de teksta kompostado - LaTeX.

Ni ŝanĝas ankaŭ tion, kiel ni dissendos ĝin. Antaŭe precipe membroj de PEJ ricevis nian informilon, nun ĉiu interesito povas ĝin aboni – sufiĉas indiki tion ĉe nia retpaĝo.

Ni ŝatus ankaŭ iomete pliriĉigi la enhavon de PEJ-aktuale, por ke ĝi ne estu nur informtabulo de PEJ, sed ankaŭ loko kie vi trovos interesajn artikolojn. Se vi havas ideon, kion ni ankoraŭ povus ŝanĝi en PEJ-aktuale, aŭ vi ŝatus mem verki artikolon por ĝi - nepre kontaktiĝu kun ni: aktuale@pej.pl

**Z nowym rokiem rozpoczynamy z nową formą PEJ-aktuale.** Dotychczas PEJ-aktuale funkcjonowało jako rozsyłana wiadomość email, od tego momentu PEJ-aktuale przygotowywane jest jako plik PDF z wykorzystaniem systemu składania tekstu LaTeX

Zmieniamy również sposób wysyłania naszego informatora. Od teraz PEJ-aktuale mogą otrzymywać nie tylko członkowie PEJ, ale każda osoba która chce - wystarczy zapisać się na naszej stronie.

Chcemy również wzbogacić zawartość PEJ-aktuale, aby nie było ono tylko tablicą informacyjną PEJ, ale również miejscem gdzie znajdziecie ciekawe artykuły. Jeżeli masz pomysły, co moglibyśmy jeszcze zmienić w PEJ-aktuale, albo chciałbyś/chciałabyś napisać jakiś artykuł - skontaktuj się z nami: aktuale@pej.pl

Piotr Hołda

# Nova jaro, novaj membrokategorioj

## Nowe kategorie członkowskie w nowym roku

Ekde kelkaj jaroj PEJ proponis al siaj membroj unuigitan membriĝon en PEJ kaj TEJO. Tio ŝparis al vi kelkajn zlotojn kaj espereble faciligis vian vivon – anstataŭ plenigi du formularojn kaj realigi du ĝirojn – sufiĉis nur unu. Duobla membreco en PEJ+TEJO kostis 70 PLN. Tute konsiderinde! Ankaŭ por noviuloj, kiuj komprenas ĉefe tion, ke ili membriĝis en junulara organizaĵo kaj ricevados koloran, paperan revuon.

Ekde nova jaro TEJO-UEA ŝanĝis la kotizojn por Pollando. Rezulte ni devis rekonsideri nian politikon. En nia propono ni decidis anstataŭigii membriĝon en TEJO per abono de Kontakto.

**Klarigo** Prezo de kategorio MA ("membro kun paperaj revuoj Kontakto kaj Esperanto") – 44 EUR – estas niaopinie prezo neklarigebla por komencantoj. Spertaj kaj konsciaj membroj povas mem aliĝi rekte ĉe UEA. Prezo de kategorio MB ("membro sen papera Kontakto") estas akceptebla, sed laŭ ni multe pli alloge estas anstataŭe proponi solan abonon de Kontakto.

La kialo estas pragmateco kaj fokuso je malspertaj membroj. La spertaj (espereble!) mem membriĝos en TEJO.

Od kilku lat PEJ proponuje swoim czlonkom „podwójne" członkostwo w PEJ i TEJO. Oszczędzało to Wam kilka złotych i mamy nadzieję ułatwiło życie – zamiast dwóch formularzy i przelewów był jeden. Kosztowało 70zł – całkiem przystępna cena! Atrakcyjna także dla nowych ludzi, którzy rozumieli głównie to, że są członkami esperanckich organizacji i dostaną kolorową gazetkę (Kontakto).

Od nowego roku zmieniły się ceny członkostwa w TEJO-UEA. Z tego powodu musimy zmienić układ. Zmieniamy członkostwo w TEJO na abonowanie Kontakto.

**Dlaczego tak?** Cena członkostwa MA (otrzymuje papierowe wydawnictwa Kontakto i Esperanto) – 44 EUR – jest naszym zdaniem zbyt wysoka, by proponować ją nowym ludziom przy pierwszym kontakcie z Esperantem. Doświadczeni esperantyści mogą sobie bez problemu poradzić z zapisem bezpośrednio w UEA. Cena członkostwa MB (Kontakto i Esperanto tylko cyfrowo) jest akceptowalna, ale bardziej atrakcyjne wg. nas jest zastąpić to po prostu abonowaniem papierowego "Kontakto"

W skrócie powodem zmian jest pragmatyzm i skupienie się na początkujących członkach. Doświadczeni (miejmy nad-

**Komenteto** Frederic Bastiat estas fama interalie pro substrekado, ke ĉiu ago havas ambaŭ rektajn kaj nerektajn sinsekvojn. Laŭ tiu pensoinstigo mi supozas, ke UEA:

- ne antaŭvidis ŝoviĝon de membriĝoj al abonoj
- atendos pli altan enspezon surbaze de kalkulo laŭ statistikoj de 2018 kun kotizoj de 2019 sed amare disreviĝos.

Espereble mi eraras!

zieję!) sami zapiszą się do TEJO.

**Komentarz** Frederic Bastiat jest sławny między innymi za podkreślanie, że każdy czyn ma widoczne i niewidoczne skutki. Idąc tym tokiem rozumowania nie mogę oprzeć się wrażeniu, że UEA:

- nie przewidziało przesunięć ilości członkostw na prenumeraty Kontakto,
- będzie spodziewać się większych przychodów wg. statystyk z 2018 z cenami z 2019 i gorzko się rozczaruje.

Miejmy nadzieję, że się mylę!

Tomasz Szymula

# JES 2018 malantaŭ ni, sed JES 2019 antaŭ ni

## JES 2018 już za nami, a JES 2019 przed nami

**La 10-a Junulara E-Semajno** okazis en Storkow (Germanio) jam finiĝiĝis antaŭ kelkaj semajnoj. Laŭ aliĝilo partoprenis ĝin Entute partoprenis ĝin 205 homoj - plej multe el Germanio - 83, Francio -20, Nederlando kaj Slovakio - po 14, Polando - 13, Britio - 11 (entute partoprenintoj el 28 landoj). Certe ĝi estis tre bona JES – **sed ni jam okupiĝas pri la sekva JES**.


JES estas kuna E-aranĝo de PEJ kaj GEJ *(Germana Esperanto-Junularo)* kaj ĉiujare ankaŭ multaj alilandanoj estas parto de la teamo. Ĉe JES vi do kunlaboras en internacia organiza teamo kaj havas eblon uzi Esperanton por estigi mojosegan projekton.

En la nuna periodo ni serĉas homojn por ĉiu rolo. Se vi ne certas kiuj tipoj de taskoj estas farendaj aŭ se vi ne havas specifan ideon kion vi volas fari, sed tamen volas helpi, alparolu nin kaj ni kune trovos taŭgan rolon por vi. Do skribu al ni ĉe jes@pej.pl!

**10. Młodzieżowy E-Tydzień** który odbył się w miejscowości Storkow (Niemcy) skończył się kilka tyhodni temu. Według danych z formularza zapisowaego wzięło w nim udział łącznie 205 osób - najwięcej z Niemiec - 83, z Francji - 20, z Holandii i Słowacji - po 14, z Polski - 13, z Wielkiej Brytanii - 11, a łącznie uczestnicy pochodzili z 28 krajów. Było to bardzo dobre wydarzenie – **ale zajmujemy się już następnym sylwestrzem esperanckim**.

JES jest wydarzeniem organizowanym przez PEJ i GEJ *(Niemiecka Młodzież Esperancka)* ale również inne osoby tworzą międzynarodowy zespół organizacyjny.

Obecnie szukamy ludzi do wszystkich możliwych zadań. Jeśli nie jesteś pewny/-a co konkretnie jest do zrobienia lub jeśli nie masz pomysłu co chciałbyś/chciałabyś robić, ale jednak chcesz pomóc, skontaktuj się z nami – wspólnie znajdziemy dla ciebie odpowiednią rolę. Napisz do nas na jes@pej.pl




# Nia evento | Nasze wydarzenie

## PEJ-semajnfino

29-31.03.2019 @pej@pej.pl | pej.pl/eo/semajnfino/lodzo2019 |

PEJ-semajnfino - estas nia semajnfina evento kiu okaziĝas en diversaj polaj urboj. Ĉi-foje ni renkontiĝos en Lodzo - la tria plej granda pola urbo, fama pro sia industria historio. Ni loĝos ĉe la strato Zamenhofa, ni planas tradicie urbumi kaj amikumi. Krom tio ni planas okazigi sesion de mini-prelegojn (ĝis 15 minutoj) pri diversaj temoj. Se vi havas iun temon por prezenti - jen tempo por vi! Temo de via prelego povas esti ekzemple via hobbio, laborfako, studfako aŭ simple ajna temo pri kiu vi ŝatus prelegi.
Pli da detaloj ĉe nia retpaĝo kaj ĉe FB.

PEJ-semajnfino, czyli weekend PME to nasze wydarzenie, które odbywa się w różnych polskich miastach. Tym razem spotkamy się w Łodzi - trzecim największym polskim mieście, słynnym ze swojej przemysłowej historii.
Będziemy mieszkać w hostelu przy ul. Zamenhofa. W planie tradycyjnie zwiedzanie miasta i spólne spędzenie czasu. Oprócz tego chcemy przeprowadzić sesję miniprezentacji (do 15 minut) na różnorakie tematy. Jeśli masz ciekawy temat na prezentacje - zapraszaamy! Tematem prezentacji może być związany z hobby, pracą, studiami lub po prostu dowolny temat który chciałbyś krótko przedstawić.
Więcej szczegółów na naszej stronie lub na FB.

# Partoprenu IJF-n en Italio senpage kadre de interŝanĝo!

## Weź udział w IJF we Włoszech za darmo w ramach wymiany!

**Se vi volas pasigi printempan semajnon dum Pasko for de la polaj marĉoj kaj grizaĵoj, partoprenu la interŝanĝprogramon!** Dank' al interkonsento inter tri esperantaj junularaj organizoj PEJ, IEJ kaj GEJ, ni pretas sendi unu personon senpage* al Rimini, kie 17-23 de aprilo okazos unu el la plej amataj kaj atendataj junularaj renkontiĝoj en Eŭropo. Internacia Junulara Festivalo - IJF!

**Kiel kandidatiĝi?**

- legu la regularon
- verku belan motivigleteron kaj sendu ĝin al ni (estraro@pej.pl) ĝis la 17-an de marto 2019
- Ĝuu italstile organizitan eventon proksime de la plaĝo!

Pli da detaloj pri la interŝanĝo kaj regularo: pej.pl/eo/intersango-ijf/
** interŝanĝprogramo kovras programkotizon, tranokton kaj manĝon dum la evento sen vojaĝkostoj*

**Jeśli chcesz spędzić wiosenny wielkanocny tydzień z dala od polskiej szarugi i błota, weź udział w naszej wymianie!** Dzięki umowie między trzema młodzieżowymi organizacjami (PEJ, IEJ i GEj) możemy wysłać jedną osobę bezpłatnie* do Rimini! Tam 17-23 kwietnia odbędzie się jeden z najbardziej uwielbianych i wyczekiwanych młodzieżowych spotkań w Europie - Międzynarodowy Festiwal Młodzieży Esperanckiej, IJF!

**Jak zgłosić się do wymiany?**

- przeczytaj uważnie regulamin
- napisz list motywacyjny i wyślij go na adres estraro@pej.pl do 17 marca 2019
- rozkoszuj się esperanckim spotkaniem we włoskim stylu blisko plaży!

Więcej szczegółów na temat wymiany oraz regulamin: pej.pl/pl/wymiana-ijf
** w ramach wymian pokrywamy koszta programu, noclegu i wyżywienia bez kosztów podróży*

???

# Kelkaj pensoj pri unu kunsido

## Kilka przemyśleń o pewnym posiedzeniu

**La lasta komitatkunsido de TEJO okazis en Storkow, Germanio, kadre de la 10-a Junulara E-Semajno** (27 decembro 2018–4 januaro 2019). Kaj kvankam pasis jam pli ol monato ekde la kunveno, estas kelkaj pensoj rilataj al ĝi kiuj daŭre revenas al mia kapo.

Unue, kio estas TEJO? Kial ĝi estis fondita, kiuj estas ĝiaj bazaj celoj kaj kial ĝia strukturo aspektas ĝuste tiel? Ŝajnas al mi, ke nesufiĉe da homoj demandas sin pri tio. Precipe nesufiĉe da komitatanoj kaj aliaj funkciuloj de la organizaĵo. Kompreneble, la kialoj de la fondo kaj de ĝia nuna strukturo estas historiaj – objektivaj kaj kontroleblaj en certaj fontoj, kaj la celoj troviĝas en la unua ĉapitro de la Statuto. Sed jen kion mi celas: mi rimarkas strangan, senpripensan obeemon al jam elpensitaj ideoj, sen konsidero de la vera celo. Ekzemple, laŭ mia vidpunkto esperantistoj komencis verki projektojn kaj serĉi subvenciojn ekzemple ĉe eŭropuniaj fondusprogramoj ĉefe por pliriĉigi la programon de Esperantaj eventoj kaj por plifaciligi finance alvenon de la partoprenantoj por kiuj tia vojaĝo estus tro kosta. Nun, montriĝas ke la projektojn partoprenas ofte la samaj personoj, kaj la temoj ripetiĝas aŭ estas tute senrilataj al la bezonoj de la partoprenantoj. Kompreneble, ekzistas esceptoj – feliĉe! – ekzemple la projekto AEJK, kiu ebligis la realigon de la unua afrika IJK, sed la tendenco iĝis konstatebla. Eĉ antaŭ nelonge la Estraro de PEJ ricevis proponon por partopreni en tia projekto, sed ĝia temo estis tiom enigma kaj malalloga, ke mi persone hontus provi reklami ĝin al niaj membroj. Kio okazis? Laŭ mi la logiko malantaŭ la projektoj inversiĝis: anstataŭ havi ideon kaj verki projektoproponon por ĝin financi, oni koncentriĝas je la projektopropono kaj plenigas la temon kun io moda, eĉ se sensenca aŭ senrilata al niaj atendoj. Mi ĝojas, ke TEJO multe spertiĝis dum la lastaj jaroj pri subvencipetado – nun ĝi (aŭ pli precize: ni) provu uzi tiun sperton por niaj celoj kaj ne uzi niajn celojn por subvencipetado.

Alia afero, kiun mi volus priparoli estas la organoj de TEJO. Kompreneble, estas la Estraro kiu laboras plej, kaj ĝin helpas specifaj komisionoj. Foje la Estraro estas granda, kun malpli granda signifo de la komisionoj, foje inverse. Tamen TEJO ne estas familia komerco, tial la Estraron superas la pli granda Komitato. Foje la komitatanoj ne konscias pri tio, sed ilia tasko tute ne estas aprobi ĉiun proponon de la Estraro, sed kontroli ĝin, proponi ŝanĝojn, kaj kritiki, se necesas. Tial mi aparte ĝojis, kiam kelkaj proponoj, tute neadekvataj al la tutmondeco de TEJO, estis malakceptitaj fare de la Komitato, kun ĝuste tia argumento: ni ne estas grupo de amikoj. Mi dirus eĉ pli: ni respondecas pri la funkciado de la organizaĵo antaŭ la esperantistoj kaj precipe antaŭ la junaj esperantistoj – ĉar nur se ni traktas ilin serioze, ni povas esperi ke ili aliĝos al ni. La kiomo de la membraro dependas de la kielo de nia agado – kaj ĝis nun la kiomo ne estas impona.

**Fine, mi ŝatus diri ke mi kredas je TEJO.** Mi ne dirintus tion antaŭ du aŭ tri jaroj, kiam ŝajnis al mi, ke TEJO okupiĝas nur pri eksteraj rilatoj, forgesante pri la internaj; ke ĝi zorgas nur pri la kvanto de volontuloj, neglektante la kvaliton de ilia laboro kaj ilian personan evoluon; kaj ke anstataŭ

**Ostatnie posiedzenie komitetu Światowej Organizacji Młodzieży Esperanckiej (TEJO) odbyło się w Storkow, w Niemczech, w ramach 10. Europejskiego Tygodnia Młodzieży** (27 grudnia 2018–4 stycznia 2019). I mimo że minął od niego już ponad miesiąc, wciąż wraca do mnie parę przemyśleń z nim związanych.

Po pierwsze, czym jest TEJO? Dlaczego zostało założone, jakie są jego podstawowe cele i dlaczego jego struktura wygląda właśnie tak? Wydaje mi się, że niewystarczająco dużo esperantystów zadaje sobie to pytanie – a zwłaszcza niewsytarczająco dużo osób pełniących w TEJO różne funkcje. Oczywiście, powody powstania TEJO i jego struktury są historyczne – obiektywne, możliwe do zweryfikowania w źródłach. Jednak najbardziej martwi mnie tendencja do zajmowania się tylko już zastanymi pomysłami, nie zważając na prawdziwy cel. Na przykład: esperantyści zaczęli pisać wnioski o dotacje na projekty głównie po to, żeby wzbogacić programy esperanckich wydarzeń i aby ułatwić finansowo uczestnictwo osobom, dla których byłoby to w innym wypadku zbyt kosztowne. Potem okazało się, że w projektach często brały udział te same osoby, a tematy powtarzały się – zupełnie bez związku z prawdziwymi potrzebami uczestników. Oczywiście, istnieją wyjątki – na szczęście! – na przykład projekt AEJK, który umożliwił organizację pierwszego IJK (Kongresu Młodzieży Esperanckiej) w Afryce; jednak trend stał się zauważalny. Nawet niedawno Zarząd PME otrzymał propozycję bycia partnerem takiego projektu, ale jego temat był tak zagadkowy i nieinteresujący, że ja osobiście wstydziłbym się nawet próbować go reklamować wśród naszych członków. Co się zatem stało? Uważam, że logika stojąca za projektami stanęła na głowie: zamiast mieć najpierw pomysł, a potem prosić o subwencję, aby go zrealizować, skoncentrowaliśmy się na samych wnioskach, a za temat bierzemy coś modnego, nawet jeżeli nieciekawego i bezsensownego. Oczywiście, cieszę się, że TEJO zyskało doświadczenie w zakresie pozyskiwania funduszy – teraz wykorzystajmy to doświadczenie dla naszych celów, a nie dostosowujmy naszych celów do pisanych projektów.

Inna sprawa, którą chciałbym poruszyć, to struktura TEJO. Oczywiście, to Zarząd pracuje najwięcej, a pomagają mu poszczególne komisje. Czasem Zarząd jest duży, a znaczenie komisji małe – czasem odwrotnie. Jednak TEJO na pewno nie jest rodzinnymi biznesem, dlatego nad Zarządem czuwa większy Komitet. Czasem członkowie Komitetu nie są tego świadomi, ale ich zadaniem wcale nie jest akceptowanie wszystkich propozycji Zarządu, a wręcz przeciwnie – kontrolowanie ich, proponowanie zmian i konieczna krytyka. Dlatego szczególnie się cieszyłem, gdy niektóre zupełnie nieakceptowalne propozycje Zarządu były odrzucane przez Komitet z właśnie takim uzasadnieniem: nie jesteśmy koleżeńską grupką. Powiedziałbym wręcz tak: jesteśmy odpowiedzialni za funkcjonowanie organizacji przed esperantystami, a szczególnie przed młodymi esperantystami, bo tylko gdy będziemy ich traktować poważnie, możemy liczyć na ich uczestnictwo w naszych działaniach. A te zależą w dużej mierze od liczby członków, która na ten moment nie jest imponująca.

esti la tegmenta organizaĵo por siaj Landaj Sekcioj, ĝi celas esti ties nura partnero. En la lasta JES mi vidis, ke ekzistas movada spirito en TEJO – ke oni rimarkis, ke eblas kaj indas fari multon en Esperantujo mem. Al tiu sento kontribuis interalie la prezento de Centra Reto – praktika ilo por interna kunlaboro ene de TEJO, kiu esperеble multe plibonigos la engaĝiĝon de LS-oj. Mi forte esperas, ke TEJO plu evoluos en tiu direkto.

**Na koniec chciałbym powiedzieć, że wierzę w TEJO.** Nie powiedziałbym tego dwa czy trzy lata temu. Wtedy miałem wrażenie, że TEJO zajmuje się tylko PR-em, zapominając o swoich obowiązkach wobec Esperancji. Na ostatnim JES-ie zobaczyłem, że istnieje w TEJO duch współpracy i poczucia misji. Mam silną nadzieję, że właśnie w tym kierunku będzie podążało TEJO.

Tobiasz Kubisiowski

# Remembriĝu en PEJ!

## Odnów swoje członkostwo w PME

**Nova jaro jam venis** do estas tempo por remembriĝi en PEJ!

Ni petas ĉiujn niajn membrojn remembriĝi - dank' al tio ni scias kiom da aktivaj membroj ni havas, membrokotizoj helpas vivteni la organizon. Kaj dank al membreco en PEJ vi povas partopreni en internaciaj projektoj kaj vi ricevos rabatojn por aranĝoj (ekz. Arkones, JES) ktp.

- Se vi dum lasta jaro estis membro en kategorio **PEJ** – nenio ŝanĝiĝas en la 2019 – kotizo daŭre estas **10zł**
- Se vi estis membro en kategorio **PEJ+TEJO+Kontakto** – la kategorio ne plu ekzistas en la 2019. Anstataŭ ĝi ni proponas **PEJ+Kontakto** kontraŭ **55zł**. Tiam vi daŭre ricevos papere la revuon Kontakto (sed vi ne estos individua membro de TEJO)

Se vi deziras esti individua membro de TEJO - vi bezonas fari tion mem. Klarigo pri tiu ŝanĝo troviĝas en tiu ĉi numero de PEJ-aktuale

Detaloj kaj pagebloj troviĝas en nia retpaĝo: pej.pl/eo/membrigxo

**Novwy rok już nadszedł** więc pora na odnowienie członkostwa w PEJ!

Prosimy o odnowienie członkostwa - dzięki temu wiemy ilu aktywnych członków ma PEJ, składki członkowskie pomagają utrzymać organizację. Dzięki członkostwu w PEJ możesz wziąć udział w międzynarodowych projektach, otrzymasz rabaty na udział w wydarzeniach (np. Arkones, JES) itp.

- Jeśli w poprzednim roku byłeś/byłaś członkiem w kategorii **PEJ** – nic nie zmienia się w roku 2019 – koszt członkostwa to **10zł**
- Jeśli byłeś/byłaś członkiem w kategorii **PEJ+TEJO+Kontakto** – ta kategoria przestaje istnieć w 2019. Zamiast tego proponujemy **PEJ+Kontakto** w cenie **55zł**. Wtedy dalej będziesz otrzymywać papierową wersję Kontakto (ale nie będziesz indywidualnym członkiem TEJO)

Jeśli chcesz być indywidualnym członkiem TEJO - musisz zrobić to samodzielnie. Wyjaśnienie tej zmiany opisujemy w tym numerze PEJ-aktuale.

Szczegóły i możliwości płatności znajdują się na naszej stronie: pej.pl/pl/dolacz-do-nas


kolofono

Redaktoro: Tobiasz Kubisiowski, aktuale@pej.pl

Pola Esperanto-Junularo | pej.pl |